



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 6-a de Junio 2022

Ĉeestantoj: fizike – Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar;
zome – Mikaelo Lineckij, Ŝaj Mor, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi.

Protokolo de la pasinta (maja) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

- a) Ŝlomo telefonis al 20 perantoj pri nia serĉo de magazeno kaj atendas respondojn.
- b) Eran telefonas al Rami Ŝlajn morgaŭ, pri la afero de la libroj.

2. La Landa Kongreso (Jehoŝua)

Ĉi-jare *Bejt-WIZO* ebligis al ni kunveni dum nia kutima semajntago lundo, **la 20-an de Junio**, sed pro la antaŭa agado tie ni rajtos eniri la anticipe preparotan salonon nur **je la 18h15**. Ni tamen rajtas eniri la maljunulejon (kun maskoj) ekde la 17h00 kaj babiladi en la vestiblo. La regalon prizorgos Enrica, helpota de Avigail kaj Luiza. Por la Arta Programo kontribuos Amri, Ŝaj, Mikaelo, Enrica, Luiza kaj Inbar. Ŝlomo prezentos diversajn raportojn por aprobi dum la Ĝenerala Kunveno (interplektite kun la artaj programeroj). En la mezo estos paŭzo. Mi devontiĝis forlasi la salonon ĝis la 21h00.

3. Raporto de la Kontrol-Komisiono pri 2021 (Ŝlomo)

- a) La Ĝenerala Kunveno devos aprobi la raporton.
- b) Nia statuto estas malnova kaj tre malnovstila. Ĉu ni nomu nin “Estraro”? Ĉu “Plenum-Komitato”? **Jehoŝua**: Ni ne tuŝu la malnovan statuton, ĉar ĝi estis agnoskita (antaŭ kelkaj jardekoj) far la Registristo de Societoj; kaj se ni ŝanĝos ion ajn, ni devos denove pritrakti ĉiun vorton kun ĝi.
- c) **Rezolucio**: Ni danke akceptas la Raporton de la Kontrol-Komisiono, sed la Estraro opinias, ke ĉiu el la ŝanĝoj estas harfenda. Ŝlomo tamen informiĝos neformale ĉe iu el la Registrista Oficejo, kion necesigus eventualaj ŝanĝoj.

4. Luigo de la oficejo (Ŝlomo)

Ni transdonos la taskon al la kompanio de Lior Hass (“Think Real”), kiu provu trovi luanton por ni, kontraŭ certa sumo kaj procentaĵo. Amri aŭ Ŝlomo interesiĝos pri detaloj.

5. La bankokonto de ELI (Ŝlomo)

La malfermo de la ELI-konto en *Bank Mizraĥi-Tefaĥot* (anst. la likvidita Bank Igud) estos baldaŭ efektivigita.

La venonta kunsido: lunde, la 4-an de Julio 2022, je 20h00 (Alon-Turo-2, hibride).

Protokolis: Gabi Zeevi